

Johannes R. Becher,

Kristnasko

tradukita de Manfred Retzlaff

Ekfloras nun en blanka vest'
la vintro en branĉaro.
Solece frostas birdo-nest',
la sonorilojn la krist-fest'
sonigas tra l' flokaro.

La spac' sin klinas super ni,
kaj ankaŭ ni kliniĝas.
Jen nova stel' ĉe la abi'.
Infan-songeĉe brilas ĝi,
elbranĉe ĝi vidiĝas.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnacht" de JOHANNES R. BECHER (*1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-12-02.*

MR-393-2 / Arg-794-1590 (2013-01-22 22:14:02)